

PREZO: 1:— Kr.

Löjckvist, Tiemp 1950

# MALGRANDA REVUO

Nro 6 • 1950

8a JARO

## ENHAVO:

	Pago
Kiel rigardi historiajn personojn, de Fr. v. Schiller .....	1
La poŝtmarkoj de Keren Kajemet Lejisrael, de J. Fechter .....	3
Ekstersensa perceptado, de K. Wilgenhof ....	7
Pri verecaj sonĝoj, de Ch. Heilskov .....	14
La forĝisto kaj la bakisto, de J. H. Vessel (trad. Thorsen) .....	19
Al ĉiuj esperantistoj .....	21
Debato .....	23
Malgranda Revuo .....	30
Enhavo de MR 1950 .....	31

*Redaktoro — Eldonanto:*

STELLAN ENGHOLM, HAGGE, SVEDUJO

## MALGRANDA REVUO

aperas dumonate. Prezo 1 kr. (inkl. sendkoston). Jarabono 6 kr. Unuopa ekz. al eksterlando kontraŭ 3 rpk. — S. Engholm, Box 205, Hagge, Svedujo. Poŝta ĝirokonto 26 80 23. MR ne aperigas anoncojn aŭ informojn.

Nemenditaj manuskriptoj estas resendataj nur se akompanas ilin aŭ franko por resendo.

### Perantoj

- Aŭstrio: Eldonejo "Tramondo" Neutorgasse 9, Wien I.  
Belgujo: Flandra Esperanto-Instituto, P. van Humbeekstr. 3, Brussel W.  
Brazilo: Sro Josefo Joels, Caixa Postal 2 — Lapa, Rio de Janeiro.  
Britujo: Libroservo de UEA, Heronsgate, Rickmansworth (Herts).  
Ĉeĥoslovakio: Esperanto-Asocio en ĈSR, Uralské Nám. 9, Praha.  
Danujo: Libroservo de CDEL, Pr. Jørgensgade 4 A, Kopenhago N.  
Studenta Esperanta Klubo, Nitivej 7, Kopenhago F.  
Finnlando: Eldono Vilho Setälä, Onnentie 23, Helsinki Kä.  
Francujo: Unuiĝo Esperantista de Francujo, 34 rue de Chabrol, Paris X.  
Germanujo: Dr. Siegfried Ziegler Verlag, Engelbertstrasse 7, (13 b) München-Pasing.  
Hispanujo: Sro Amado Pons, Sicilia 217, 1—2, Barcelona.  
Italujo: Sro Leo Costantini, Piazza Lagosta 2, Milano.  
Nederlando: Sro L. C. Deij, Putsebocht 181, Rotterdam Z.  
Palestino: Sro J. Kohen-Cedek, P. O. B. 7015, Jerusalem.  
Polujo: R. Sakowicz, Parafialna 3, Nova Sol.  
Svisujo: Sro O. Walder, Eigenheim, Romanshorn.  
Usono: Libroservo de American Esperantist, 114 W. 16 St. New York 11.

## MALGRANDA REVUO

Nro 6

8a JARO

1950

### Kiel rigardi historiajn personojn

(La enkonduko de "Krimulo pro perdita honoro" de Fr. v. Schiller.)

En la historio de la homo neniu ĉapitro estas pli instrua por koro kaj menso ol tiu de liaj pekoj. En ĉiu grava krimo moviĝis relative granda forto. La sekreta regado de la avidforto sin kaŝas je la malpli forta lumo de ordinaraj afekcioj sed fariĝas en stato de perforta pasio des pli frapa, kolosa, laŭta; la pli subtila homesploranto, kiu scias, kiom oni efektive povas atribui al la mekaniko de la ordinara vollibereco kaj kiom estas permesite konkludi analogie, povas transmeti multan sperton el tiu kampo en tiun de sia psikologio kaj ĝin valorigi por la etika vivo.

La homa koro estas ja tiel simpla kaj aliflanke tamen tiel komplika. Unu sama kapablo aŭ avido povas varii en milspecaj aperoj kaj tendencoj, naski mil kontraŭdirajn fenomenojn, povas aperi en mil karakteroj diverse miksitaj; mil malsamaj karakteroj kaj agoj povas esti produktoj de unu sama inklino, ĉe se la homo, pri kiu temas, neniel suspekta tian parencecon. Se por la homa gento ekstarus iu Linné, same kiel por la ceteraj regnoj de la naturo, kiu klasifikus laŭ instinktoj kaj inklinoj, oni tre mirus, kiam oni trovus en sama klaso kiel la monstro Borgia (Borĝa) multajn homojn, kies malvirto nun devas sufokigi en malvasta burĝa sfero kaj en mallarĝa ĉirkaŭbaro de la leĝoj.

Konsiderante de tiu flanko oni rajtas multe argumenti kontraŭ la ordinara prilakto de la historio, kaj ĉi tie, mi supozas, kuŝas la ĉefa malfacilaĵo, kial la historia studado ankoraŭ



ĉiam restas tiel senfrukta por la socia vivo. Inter la anima eksciteco de la aganta homo kaj la trankvila animstato de la leganto, antaŭ kiun estas melata la ago, regas tia forta kontrasto, kuŝas tia larĝa interspaco, ke al la leganto fariĝas malfacile, eĉ neeble, suspekti interligon. Inter historia subjekto kaj la leganto restas malplenaĵo, kiu lasas neniun eblon por komparo aŭ aplikado kaj kiu anstataŭ bonfaran terurigon kun averto al la fiera animsanulo kaŭzas nur kapskuon pro miro. La malfeliĉulon, kiu estis homo kiel ni en la horo de agplenumo same kiel en tiu de pentofaro, ni rigardas kiel kreitaĵon de fremda speco, kies sango cirkulas alie ol nia, kies volo obcas aliajn regulojn ol nia; liaj sortoj malmulte kortuŝas nin, ĉar kortuŝon kaŭzas ja nur neklara konscio pri simila danĝero, kaj ni neniel eĉ songas pri tia simileco. La instruo perdiĝas kune kun la manko de interrilato, kaj la historio, anstataŭ esti lernejo por kulturo, devas kontentiĝi per mizera kontribuo al nia scivolemo. Por ke ĝi estu al ni pli multe kaj atingu sian gravan finecon, ĝi devas nepre elekti inter jenaj du metodoj — aŭ la leganto varmiĝu kiel la heroo, aŭ la heroo malvarmiĝu kiel la leganto.

Mi scias, ke el la plej bonaj historiistoj de nia epoko kaj de la antikva multaj praktikis la unuan metodon, subaĉetante la koron de siaj legantoj per entuziasmiga prezentado. Sed tiu maniero estas uzurpo de la verkisto kaj ofendas la respublikan liberon de la leganta publiko, al kiu decas juĝi mem; ĝi estas ankaŭ ofendo al la limrajtoj, ĉar tiu metodo apartenas ekskluzive al oratoroj kaj poetoj. Al historiisto restas nur la lasta metodo.

La heroo devas fariĝi malvarma kiel la leganto aŭ, kio signifas ĉi tie la samon, ni devas konatiĝi kun li, antaŭ ol li agas; ni devas vidi lin ne nur plenumi la agon sed unue voli ĝin. Liaj pensoj estas al ni senfine pli gravaj ol liaj faroj, kaj eĉ pli gravaj estas la fontoj de tiuj pensoj ol la sekvoj de la faroj. Oni esploris la grundon de Vesuvio por ekscii pri ĝia ekbrulo; kial oni donas malpli da atento al morala fenomeno ol al fizika? Kial oni ne konsideras samgrade la naturon kaj la situacion de la aferoj, kiuj ĉirkaŭis tian homon ĝis ekbrulis la tindro amasiĝinta en lia interno? Revulon, kiu

amas la mirindan, altiras la strangeco kaj aventureco de tia aperaĵo; amiko de vero serĉas patrinon de tiuj perditaj infanoj. Li serĉas ŝin en la neŝanĝebla strukturo de la homa animo kaj en la ŝanĝiĝaj kondiĉoj influantaj ĝin de ekstere, kaj en ambaŭ tiuj li certe trovos ŝin. Li ne plu surpriziĝas, vidante ke en la sama bedo, en kiu floras sanigaj herboj, kreskas ankaŭ venena cikuto, trovante kune en la sama lulilo saĝon kaj stulton, malvirton kaj virton.

Se ni ne konsideras iun el la avantaĝoj, kiujn la animscienco gajnas el tia pritraktmaniero de la historio, ĝi tamen meritas konsideron jam tial, ke ĝi ekstermas la kruclan mokon kaj fieran aplombon, kun kiuj la netentita, rekte staranta virto ordinare malsuprenrigardas sur la falintan; tial, ke ĝi disvastigas la mildan spiriton de toleremo, sen kiu neniu forkurinto revenas, neniun repaciĝo okazas de la loĝo kun ĝia ofendinto, neniun infektita membro de la socio estas savata de pereco.

Tradukis Josef Sommer.

## La poŝtmarkoj de Keren Kajemet Lejisrael

*De J. Fechter*

Keren Kajemet Lejisrael (Israela nacia fondaĵo) festos venontjare sian 50an ĵaron. Ĝi estis fondata 1901 en la kvina cionista kongreso en Baslo. Ĝia centra ideo estas: la tero apartenas al ĝia popolo. Keren Kajemet estas la plej grava ilo de la cionista movado por akiri terojn kaj utiligi ilin. Ĝi plantas arbarojn, plibonigas la teron, akvas dezertojn kaj tiel preparas la fundamentojn de la koloniigo en Israelo. Ĝia terposedaĵo estas ne vendebla. La koloniistoj estas nur luantoj de la tero, la grundo apartenas al Keren Kajemet. Ĝi estas ne nur ekonomia entrepreno, sed ĝi multe agas ankaŭ en la eduka medio kaj en la literatura kampo. La poŝtmarkoj, pri kiuj temas tiu ĉi artikolo, estas eduka rimedo, per kiuj la infanoj akiras sciojn pri la aktiveco de Keren Kajemet, pri



la novaj koloniigoj en Israel kaj pri la historio de la famaj verkistoj kaj poetoj en la popolo.

Dum sia kvindekjara ekzisto K. K. L. aperigis centojn da poŝtmarkoj. La vico komenciĝas per tiu, kiun oni eldonis 1902 tuj post la fondiĝo (ĝi estas blua sur blanka fono, sur ĝi troviĝas la vorto Cion en la mezo de davida kiraso), kaj ĝi finiĝas per la markoj, kiuj aperis en la jam aŭtonoma israela ŝtato. Tiuj lastaj simboligas la apogeon de la atingoj en la historio de la hebrea popolo, kiam oni sukcesis starigi la judan ŝtaton. Tiuj markoj estas historiaj dokumentoj, kiuj rakontas pri la vojo al la fondiĝo de la juda ŝtato. La markeldonoj markas la gravajn okazojn de la cionista entrepreno kaj de la ŝtatkonstruo, eternigas la nomojn de la gravaj personoj, kiuj dediĉis kaj oferis sian vivon al tiu entrepreno. Ili montras al la hebrea popolo en la tuta mondo pejzaĝojn kaj vidindaĵojn de Palestino, ĝiajn historiajn hebreajn lokojn, bildojn de hebreaj urboj kaj vilaĝoj, hebreajn instituciojn, kiuj troviĝas sur la tero de K. K. L. ktp.

La markoj de K. K. L. multe helpis por la disvastigo en eksterlando de la ideoj de cionismo. Ĉiu cionisto gluis la markojn sur la leterojn, kiujn li sendis. La judaj filatelistoj rekonis la nacian valoron de tiuj markoj, kaj por havigi al si la iluzion, ke tiuj markoj efektive estas poŝtmarkoj, ili metis ilin apud la verajn poŝtmarkojn sur la kovertoj, por ke la poŝta stampilo trafu ankaŭ ilin, kaj ili tiel ricevu valoron de hebrea poŝtmarko. Ili vidis en tiuj markoj simbolon de renaskiĝo de la hebrea ŝtato. Precipe la junulaj organizoj uzis la markojn. En urboj kun hebrea loĝantaro organizis sin antaŭ la unua mondmilito grupoj de volontuloj-leterportistoj, kiuj portis la leterojn kun la markoj de K. K. L. Tiel la hebreaj junuloj kreis hebreajn poŝtoficejojn en tiaj urboj kaj tiel donis poŝtan valoron al la markoj de K. K. L.

La ideo de tiuj markoj multe disvastiĝis en Israel antaŭ la unua mondmilito. Apud la turka poŝtoficejo starigis multaj eŭropaj ŝtatoj siajn proprajn poŝtoficejojn, ekz. Ruslando,

Aŭstrio, Germanujo ktp. Tiam la hebreaj kolonioj Petaĥ Tikvah kaj Riŝon Lecion eldonis siajn proprajn poŝtmarkojn kun hebrea teksto. La leteroj kun hebreaj poŝtmarkoj estis sendataj nur en Palestino.

La markoj de K. K. L. fariĝis la oficialaj markoj de la "Juda ŝtato survoje". Oni gluis ilin sur ĉiun petskribon al la palestinaj oficejoj eksterlande. Ĉiuj oficialaj atestoj estis kotizataj per la markoj de K. K. L. Oni gluas ilin sur ĉiujn lernejajn atestojn, sur ĉiujn kontraktojn faritajn kun K. K. L. koncerne luon de tero, sur ĉiujn polisojn de asokuraj societoj ktp.

Nun estas tre malfacile kolekti ĉiujn markojn, kiujn K. K. L. eldonis dum la kvindek jaroj. Kelkaj estas tre maloftaj kaj ekzistas nur en unikaj ekzempleroj, kiuj troviĝas ĉe malnovaj kolektantoj. La nombro de kolektantoj estis antaŭe malgranda, sed nun estas ordinara afero kolekti la markojn de K. K. L., kaj la markojn kolektas judaj kolektantoj kaj filatelistoj en la tuta mondo. Estas malfacile akiri kompletan kolekton, tamen multaj klopodas havigi al si tian, kaj posedanto de kompleta kolekto povas rigardi sin riĉulo.

La 15an de majo 1948 renaskiĝis la juda ŝtato, kaj en tiu historia tago denove eniris en ĉiutagan uzon la poŝtmarkoj de hebreaj poŝtoficejoj, datitaj per stampo de tiu tago. En ĉiuj poŝtoficejoj en la lando kaj precipe en Jerusalemo oni utiligis la pretajn markojn de K. K. L., t. e. la markoj kun la israela landparto, sur kiujn oni metis la stampon "Doar" (Poŝto) kaj la prezon de la marko.

Tiel la markoj de K. K. L. fariĝis la unuaj poŝtmarkoj en la juda ŝtato.

Jen kelkaj markoj de K. K. L.:

1. Dro Theodor Herzl, fondinto de la cionista organizo. Li naskiĝis en Budapeŝto 1860, mortis en Vieno 1904. Liajn ostojn oni en 1950 transportis al Israelo.

2. Dro Max Nordau, mondfama verkisto; naskiĝis en Budapeŝto 1849, mortis 1923 en Parizo. Liaj ostoj estas enterigitaj en Tel-Aviv.

3. Herman Sapira, profesoro de matematiko en la universitato de Heidelberg. En la unua cionista kongreso en Baselo li projektis la fondiĝon de K. K. L. Naskiĝis 1840, mortis 1898.



4. Josef Trumpeldor, fondinto de la pionira organizo "Hehaluc", naskiĝis 1880 en Kaŭkazio, mortis 1920 en la milito kontraŭ la araboj. Mortante li diris: "Ne gravas, estas bone morti por la patrujo."



La menciitaj markoj 1—14 kun komenco de supre kaj de maldekstre dekstren.

5. H. N. Bialik, la plej granda nacia poeto en hebrea lingvo, naskiĝis 1873, mortis 1934.

6. Arlozorof Haim, cionista propagandisto, naskiĝis 1890, mortis 1933 en Tel-Aviv.

7. Barono Edmond de Rothschild, naskiĝis 1845 en Boulogne-sur-Seine, mortis 1934 en Parizo. Multe helpis por financi la israelan koloniigon.

8. Rabeno Abraham Izak Kuk, filozofo kaj propagandisto de cionismo, naskiĝis 1865, mortis 1935 en Jerusalemo.

9. Dizengof Meir, la fondinto kaj urbestro de Tel-Aviv, naskiĝis 1861, mortis 1937 en Tel-Aviv.

10. Henrieta Sold, aktiva propagandisto cionista, naskiĝis 1860 en Baltimore, mortis 1940.

11. N. de Lima, socialista gvidanto en Nederlando, prezidanto de K. K. L. 1914—1922. Naskiĝis 1882 en Haag, mortis 1941 en la sama urbo.

12. Weizman Chaim, nuna prezidanto de la israela ŝtato, naskiĝis 1873.

13. Rabeno Meir Berlin, redaktoro kaj verkisto cionista, naskiĝis 1902, mortis 1949.

14. Hinkin Jehoŝua, fondinto de la kolonio Riŝon Lecion, naskiĝis 1864, mortis en Israelo 1946, en la valo Jezreel.

## Ekstersensa perceptado

*De K. Wilgenhof*

La kapablo "vidi" en la estontecon kaj percepti aferojn nevideblajn por okuloj aŭ ne aŭdeblajn per oreloj sendube apartenas al la plej rimarkindaj. Pro manko de aparta termino oni ĝenerale signas tiun perceptopovon — kiu ne estas normala perceptado, t. e. ne funkcias per sensoj — per esprimoj kiel "klarvidado, dua vido, verdirado, spiritvidi, fantomrigardi" k. s.

Enkonduki tiajn terminojn en Esperanton estas nepreferinde. Unue kelkaj el ili ne ampleksas la tutan nocion, ĉar temas ne nur pri perceptado simila al vido, sed plurfoje ankaŭ pri perceptoj similaj al aŭdo, palpo, flaro, kaj tre ofte la ekscio sin prezentas ne en formo de sensa perceptaĵo, sed nur per konsciigo, per eksento. Aliaj esprimoj (spiritvidi



k. s.) anticipas klarigon pri la fenomenoj, kiu tre verŝajne estas falsa.

Por eviti ĉiujn tiajn terminojn kaj ne ŝarĝi vortojn jam ekzistantajn en Esperanto per plua signifo, ni devas serĉi novan vorton. Por atingi tion estas rekomendinde unue iom pliklarigi la karakteron de la fenomeno kaj ĝian lokon inter parencaj aferoj.

#### Enklasigo de la fenomeno.

Ĉar la traktata povo ne estas normala perceptado, sed havas komunajn trajtojn kun ĝi, oni karakterizas la fenomenon per la termino *paranormala*. La elekto de tiu vorto bezonas motivigon. La psikajn fenomenojn oni povas dividi en normalajn kaj nenormalajn. Ĉe la lastaj oni povas distingi inter: malnormalaj (ekz. idioteco, neŭrozoj), supernormalaj (ekz. mirige grandaj memoro aŭ kalkulpovo) kaj paranormalaj (ekz. telepatio, homa magnetismo, spiritismaj fenomenoj kaj la ĉi-temaj senokula vido kaj senorela aŭdado). La prefikso *para* devenas el la antikva greka lingvo kaj signifas apud, krom, laŭlonge de. Per la termino *paranormala* oni do volas esprimi, ke la koncernaj fenomenoj montras ian similecon (paralelecon) kun iuj normalaj psikaĵoj. Laŭ la sama vidpunkto la scienco, kiu traktas paranormalajn aferojn, nomiĝas *parapsikologio* (ankaŭ *metapsikio*).

La vortoj *paranormala* kaj *parapsikologio* povas nin konduki al la serĉata termino. Ĉar la ĉi-tema povo estas perceptopovo, kiu sin prezentas flanke de la ordinara perceptado, ni povas ĝin nomi *paraperceptado*.

Paraperceptado do estas la povo ekstersense pli malpli klare<sup>1)</sup> percepti aŭ ekscii aferojn estantaj, estintaj kaj estontajn kaj ne dependa de alia menso.

Paraperceptado estas distinginda de alia fenomeno simila al ĝi: telepatio. La diferenco inter ambaŭ fenomenoj estas tio: ĉe telepatio persono ricevas impreson pri imago de alia persono. Ĉe paraperceptado persono psike perceptas ian okazon aŭ aferon ne depende de alia persono. Telepatio do staras flanke

de paraperceptado; ambaŭ estas manieroj de paranormala eksciado.

La parapercepta kapablo havas du aspektojn: paraperceptado en la spaco kaj paraperceptado en la tempo. Kelkfoje estas kvazaŭ iu disponas miraklajn perceptorganojn, kiuj penetras tra ĉia materia baro. Li aŭ ŝi "vidas", "aŭdas" aŭ sentas aferojn estantajn ie en la mondo. Ŝajne distanco kiom ajn granda ne influas la paranormalan percepton. Aliffoje estas kvazaŭ la tempo ne plu ekzistas. La paraperceptanta persono rimarkas estontajn aŭ estintajn aferojn kvazaŭ ili estus nunaj. La unua aspekto koncernas paranormalajn perceptojn, kiuj havas lokon en la momento de la percepto. Male ĉe paraperceptado en la tempo iu ekhavas impreson pri aferoj okazantaj aŭ okazintaj.

La montrita enklasigo de la paranormala eksciado estas iom arbitra kaj faritoca. En vero definitivaj limoj inter la diversaj kampoj ne ekzistas. La reale okazantaj fenomenoj ofte prezentas "miksaĵon" de diversaj aspektoj. Supozinde la nombro de fenomenoj estas tiom da manifestadoj de unu povo. Sed ni bezonas la distingigan dividon por povi trakti la studatajn faktojn.

Persono, kiu ofte spertas paraperceptojn, ni povas nomi *paraperceptanto* aŭ se li aŭ ŝi profesie okupas sin per tiaj perceptoj por klientoj, *paraperceptisto*.<sup>2)</sup>

#### Kelkaj ekzemploj.

La paraperceptaj ekscioj ne ĉiam estas klaraj al la eksciinto mem. Tion montras i. a. jena ekzemplo pri nederlandano, G. Croiset. Li konatiĝis post la milito kiel sukcesa paraperceptanto kaj ankaŭ kiel t. n. "magnetisto". Iun tagon lin konsultis sinjorino, kiun Croiset en la konsulto i. a. demandis, ĉu ŝi ŝatas sekvinberojn. "Ne", ŝi respondis, "mi abomenas ilin." Ĉu ŝi do oficas ĉe komercisto de sekvinberoj? Ankaŭ ne. "Mi tute ne komprenas", diris Croiset, "mi vidas keston malantaŭ vi, kaj sur ĝi oni skribis per grandaj literoj: Smirnaj sekvinberoj." "Nun estas klare al mi", la sinjorino respondis, "mi naskiĝis en Smirna"<sup>3)</sup>. (el Zorab, *Wonderen der parapsychologie*.)



Verŝajne estas apenaŭ aldoninde, ke la ŝanco, ke nederlandano naskiĝas en turka urbo, estas tre malgranda. La fakto ke Croiset havas scion pri pakado de sekvinberoj — li laboris dum kelkaj jaroj en firmo de nutraĵoj — supozeble estis la kaŭzo, ke ĝuste tiu bildigo okazis ĉe li. Oni nomas tian bildon simbolo. Paranormala eksciado per simboloj ne estas malofta.

Ekzistas ankaŭ paraperceptaj sonĝoj. Interesan studon pri tio angla aviada oficiro J. W. Dunne prezentis en sia verko "An Experiment with Time" (eksperimento pri la tempo), en kiu li i. a. priskribis plurajn tiajn sonĝojn el la propra vivo. En 1913 li sonĝis, ke li estas ĉe tre alta fervojdigo norde de la riverfino Firth of Forth (Skotlando). Li "vidis" grupetojn da homoj kaj vagonojn de trajno, kiu ĵus elreliĝis, ŝoviĝantajn malsupren sur deklivo. Li eĉ konsciĝis, ke tio reale okazos en marto aŭ aprilo de la sekva jaro. La postan matenon li rakontis la sonĝon al la fratino. Je la 14a de aprilo 1914 la faman rapidvagonaron Flying Scotchman trafis akcidento 24 km norde de Firth of Forth. Dum veluro ĝi falis de la reldigo sur malsupre kuŝantan golfludejon.

Ekzemplo de antaŭscio bazita sur aŭda impresado estas ĉi tiu (laŭ Tenhaeff, Oorlogsvoorspellingen, p. 235): En 1918 iu virino, sidanta ĉe la lito de sia kelksemajna infaneto, meditis pri la demando, kion la vivo alportos al li. Subite ŝi kvazaŭ aŭdis voĉon, kiu diras: "Li havos penigan junaĝon kaj juna kaj perforte mortos." Tiu komunikado, kiu forte skuis kaj timigis ŝin, konfirmiĝis en 1945, kiam la vivo de ŝia filo finiĝis en gasmortigejo. Kiel leŭtenanto de la nederlanda armeo li devis reiri en germanan militkaptitecon en 1942. Pro klopodoj forkuri oni metis lin en la koncentrejon Mauthausen.

Ankaŭ pri tiu morto la malfeliĉa patrino, kiu ofte "suferis" (laŭ ŝia esprimo) pro antaŭsentoj, havis rimarkinde klaran vizion. En nokto en januaro 1945 ŝi vekiĝis kvazaŭ pro ektuŝo de iu ((palpa impresado!) kaj "vidis" la filon sub lumo en ĉelo. Ŝi aŭdis frapon (aŭda impresado) kaj li falis, sed evidente ne vundita. Poste en la nokto dum alia vizio ŝi vidis la korpon de la filo ĉe multaj kadavroj, kiujn oni ŝovis en brulĉambron. Kiam ŝi klopodis pliintensigi la atenton la bildo malaperis.

Laŭ postaj oficialaj esploroj la leŭtenanto tre verŝajne

forpasis en februaro 1945. Ĉu li vere mortis en gasĉelo aŭ ĉu pro korpa forkonsumiĝo, oni ne plu povis eltrovi.

### Diversaj vidpunktoj.

Se en la lasta ekzemplo la morto de la filo okazis post la vizio de la patrino, la parapercepto estis antaŭscia. Sed se la vizio okazis samtempe kun la lastaj travivaĵoj de la oficiro, ni devus nomi ĝin parapercepto en la spaco. Tamen en la lasta kazo, do se ni supozas samtempecon, pluraj eble preferas klasigi la fenomenon telepatio, t. e. la filo pensis pri la patrino dum siaj lastaj minutoj, kaj tio aperigis la vizion al ŝi. Parolante pri telepatio ni devas krome aldoni, ke ankaŭ ĉe tiu fenomeno renkontiĝas tempa diferenco, tiel ke en kelkaj kazoj ni povas paroli pri antaŭscia telepatio. Tion malkovris usona parapsikologo Rhine dum eksperimentoj pri telepatio. Ankaŭ Soal kaj Whately Carington en Anglujo trovis tian tempan diferenccon ĉe similaj eksperimentoj.

Montriĝas do, ke paraperceptado en la spaco, antaŭsciado — kiu estas unu el ambaŭ branĉoj de paraperceptado en la tempo, la alia estas la paranormala eksciado de pasintaj aferoj — kaj telepatio ne estas definitive interdistingeblaj. Klaraj limoj ne ekzistas. Pro tio kelkaj parapsikologoj emis nei ke paraperceptado en la spaco vere ekzistas. Laŭ ilia opinio ĝi povas esti spaco de telepatio. Estas kvazaŭ la paraperceptanto dum tempeto pruntus la sensojn de alia homo. Tiu lasta normale perceptas la okazon, kiu ofte koncernas lin mem, per okuloj kaj oreloj, kaj telepatia ligo inter li kaj ne ĉeestanta persono transigas la sensajn impresojn al alia psiko. Kaj en la kazo, kiam paraperceptanto antaŭsciigas okazojn el ius estonta vivo, li ĉerpas tiun scion el la psiko de tiu, pri kiu li parolas.

Laŭ tiu vidpunkto paraperceptado konsistus el telepatio kaj ev. antaŭsciado (aŭ alifoje "postsciado"). Kvankam en kelkaj kazoj de paraperceptistaj informoj tio ŝajnas ĝusta, restas tamen dubinde, ĉu oni povas tute elimini spacan perceptadon el la metapsikaj fenomenoj. K. H. E. de Jong, nederlanda aŭtoro de parapsikologia verko, citas ekzemplon el verkaĵo de iu d-ro Dufay, "La vision mentale", en kiu estas rakontata pri iu Janicaud, lernanto en seminario. Li ofte transiĝis en



somnambulan staton, kiun akompanis paraperceptaj fenomenoj. Iun nokton Janicaud levis sin en la lito kaj komunikis al kamaradoj, ke kato en laborejo renversis pladon, tiel ke ĝi rompiĝis en kvin pecojn. Oni tuj iris al la laborejo kaj konstatis la ĝustecon de la komuniko. Se oni kontestas paraperceptadon en la spaco, tiu ekzemplo estas akceptebla nur kiel ekzemplo de telepatia ligo inter homo kaj besto, tie ĉi la kato. Sed ŝajnas nekredeble, ke la kato eksciis la nombron de la pecoj.

Estas konate, ke ankaŭ ĉe bestoj metapsikiaj fenomenoj okazas. Oni mencias ekzemplon de hundo, kiu kiel unua ekvidis fantomon de knabo kaj per sia bojado atentigis la ĉeestantajn homojn. La knabo, kiu troviĝis en alia loko kaj estis mortanta en tiu momento, estis konato de la personoj. Se oni volas teni la hipotezon de telepatio, oni devus supozi telepatian ligan inter la knabo kaj unu el la konatoj kaj krome paranormalan influon de ĉi tiu al la hundo kaj la aliaj ĉeestantoj. Tio ŝajnas iom tro komplika.

#### Nesolvita demando.

La konsterna fakto, ke ekstersensa perceptado evidente dependas nek de la spaco nek limiĝas al la nuno en la tempo, supezeble estas konsekvenco de la ekstersenseco. Vidado per la okuloj parte estas fizika fenomeno. Lumradioj trafas la okulon reton, kaj oni vidas. Sed tiuj radioj ne povas penetri tra ĉiuj materioj. Ankaŭ la atingo de sonoj estas tre limigita, ĉar la vibrado, kiu estas la fizika formo de sonoj, estas pli malpli baldaŭ bremsata de la portanta aero aŭ alia medio. Tiel niaj sensaj funkcioj puŝiĝas kontraŭ materiaj baroj, kiuj ne ekzistas por nesensa percepto. Cetere materiaj fenomenoj estas iel ligitaj al la tempo kaj la leĝo de kaŭzo kaj sekvo (almenaŭ tiel ŝajnas en la ĉiutaga vivo), kaj ankaŭ tio signifas limigon al la sensoj, kiun ne renkontas la ekstersensa perceptado.

Atentinde estas, ke kiom ajn miraklaj kaj nekredeblaj ŝajnas paranormalaj perceptoj post la unua ekkono pri ili, la ordinara persensa perceptado fine estas ne malpli kurioza kaj nekonceptebla de la menso. Tion ni forĝesis, ĉar normalaj perceptoj estas ĉiumomente spertata afero.

Oni povas ofte renkonti la opinion, ke paraperceptado okazas per aparta senso, same kiel ni vidas per vidorgano, aŭdas per aŭdorgano, k. t. p. Tial oni aŭdas paroli pri t. n. "sesa senso", kiu estus la paraperceptopovo. Se oni volas iom pli konsideri tiun supozon, oni baldaŭ vidas, ke tia "sesa senso" ne ekzistas.

D-ro P. A. Dietz, psikiatro, skribis en nederlanda revuo parapsikologia: "Estas propreco de ĉiu el niaj sensoj, ke ĝia ekscito estigas apartan specon de perceptado, kiu estas propra al tiu senso kaj kiun ni ne povas kompari kun io alia, precipe ne kun ekscito de alia senso . . . Se ni havus "sesan senson", ĝi devus vekti dum sia funkciado tute propraspecan percepton, same diferencon de vido, aŭdo, flaro, gusto aŭ palpo, kiel tiuj inter si diferencas. Dum parapercepto en la plejmulto de la kazoj io estas vidata, ĝuste kiel okulo vidas, aŭ en malplimulto de la provoj io estas aŭdata, gustata, palpata, flarata. Tiu tiel nomata sesa senso do ne staras kiel "sesa" apud la kvin aliaj; rimarkinde estas ĝuste tio, ke ĝi ne aldonas ion specife "novan" al la mondo de niaj perceptoj. Sed ĝi povas kvazaŭ anstataŭi la aliajn sensojn. El tio sekvas, ke ĝi ne estas 'senso'."

Ankaŭ la parapsikologo Whately Carington kontestas la hipotezon de sesa senso en sia verko "Telepathy". Li diras, ke laŭ ĉiu konsiderata aspekto la paranormala fenomeno estas alia ol sesa perceptado. Se oni supozas sesan senson, li demandas: "Kio estas la energifonto elsendanta la crojn aŭ faranta la ondojn, kiuj estigas la emanajon? Kiel ili povas penetri tra materiaj objektoj laŭ maniero, laŭ kiu neniu alia speco de materioj aŭ energio povas tion fari? Kiuj estas la ricevaj organoj? Kiuj nervofadenoj kondukas al la cerbo?" Kaj pli da demandoj, nerespondeblaj laŭ la vidpunkto de sesa senso, li levias.

Kio do estas la parapercepta povo, se oni povas ne akcepti sesan senson? Fizikteoriuloj enkondukis la tempon kiel kvaran dimension de la fizika mondo, t. e., laŭ ilia teorio la spaco havas tri ordinariajn spacajn dimensiojn, larĝon, longon, altan, kaj kvaran, la tempon. Kelkaj parapsikologoj kredis trovi en tio bonvenan helpon por la klarigo de paraperceptado en la tempo. Dum antaŭsciado (ankaŭ dum paranormala postsciado) la paraperceptanto psike moviĝus laŭdirekte de la tempa dimensio.



Sed la nocio movi implicas la ekziston de tempo. Do tiu movado laŭlonge de la tempo estas pensebla, nur se oni subkomprenas alian superan tempon. Kaj tio estas iom nekontentiga. Dunne ne estis multe ĝenata de tiu neglataĵo en la hipotezo. Li akceptis la duan tempon kaj tute konsekvence ankaŭ trian, kvaran, kvinan kaj tiel plu sen fino. Estas vere, ke ankaŭ atomteorianoj ne restis kontentaj nur per kvara dimensio. Por "klarigi" (almenaŭ koncepti en kompleta teorio) la ecojn de elektronoj ili elpensis plurdimensiajn modelojn. En la matematiko oni jam longe studis pri multidimensiaj geometrioj. Tamen la teorio de Dunne ne atingis ĝeneralan aprobon. Per ĝi oni ne povas solvi plurajn problemojn de la paranormala eksciado kaj de aliaj paranormalaj fenomenoj. La klarigo de paraperceptoj ankoraŭ prezentas nesolvitan demandon.

1) Sed plejofte nur pale, nebule. Ankaŭ tial la terminoj "klarvidado" aŭ "klarvideco" por ĉi tiu nocio estas evitindaj.

2) Estas notinde, ke estas riska afero konsulti paraperceptiston por ekscio de privata sorto. Parapsikologoj eltrovis, ke multaj paraperceptistoj ne ĉiutage samgrade disponas pri sia kapablo. Dum malfavora periodo ili eble tamen volas doni komunikojn pro la enspezo aŭ pro prestiĝo. Povas okazi, ke ili tiam nekonscie faras (sin)-trompon. (Pri tiuj, kiuj estas nur krudaj trompantoj kaj fiprofitistoj, ni ne parolu.) Krome pluraj ne scias distingi inter paraperceptoj kaj la telepatiaj impresoj devenaj de la konsultanto. Tiel ili "reflektas" sopirojn aŭ timojn de kliento. Ĉu estas necese klarigi, kia psika danĝero sin kaŝas en tio por tiu lasta?

3) Urbo en Turkujo.

## Pri verecaj sonĝoj

*De Ch. Heilskov*

En nro 3/1946 de MR mi skribis artikolon, kiun mi nomis "La enigmo de la tempo". Ĝi pritraktis strangan sonĝon. La legintoj de tiu rakonto eble memoras, ke ĝi temas pri dumdorma vido de kaj spertoj en regiono de mi nekonata, kiun mi fizike vidis nur unu jaron poste. Estimata samideano, sro J. van Schepelen, en la posta numero donis kelkajn rimarkigojn, per kiuj li montriĝis sperta pri la koncernaj pensosferoj.

Sro van S. skribis interalie: "Ne nur la mortantoj forlasas la fizikan mondon, sed ankaŭ la vivantoj kelkfoje vagas en la alia mondo." La leganto eble povus demandi, ĉu entute ekzistas alia mondo ol tiu ĉi. Al li mi volas diri: "Legu tion, kion skribas la eminenta matematikisto kaj filozofo Ouspenski en la verko "Tertium organum" pri la blindeco kaj miopeco de la materialisma scienco. Tamen la sinteno de la sciencularo de nia tempo al la transcenda mondpercepto komencas malrapide transformiĝi.

Mi tute konsentas kun sro v. S., ĉar mi mem havis kelkajn spertojn similajn al tiuj de li priparolitaj. Pri la restado de la mio sur la "superfizika" plano dum la fizika korpo dormas, mi permesas al mi prezenti kelkajn spertojn kaj tiamaniere atingi interrilaton kun eventualaj samspertintoj. La sekvontaj asertoj kaj rimarkigoj ne estas prezentotaj el religia vidpunkto sed el nura homa intereso por eltrovi la veron. Kaj tial estas nepre grave kolekti informojn pri personaj spertoj.

Parolante pri la "alia mondo" sro van S. sendube opinias tiun ekzistsferon (planon), kiu estas plej proksima al nia mondo. Ĝi estas io difinita, kiu povas esti studata kaj ne kiel la ordinara eklezia ĉielo nur povas esti objekto de kredo.

En la psika literaturo oni kelkfoje vidas la vortojn "verecaj sonĝoj", do sonĝoj, kiuj estas konformaj al la vero. Sed ili ŝajne estas relative maloftaj. Ĉis nun mi trovis nur du homojn, kiuj (neadmonite) rakontis al mi pri spertoj similaj al tiuj, kiujn mi mem havis.

Laŭ mia sperto la "alia mondo" (aŭ astrala plano) do estas reala kaj objektiva fakto kaj ne ia aera ĉielsfero (pri eĉ pli alta ekzistsfero mi ne ĉi tie pensas). Male ĝi estas tiom firma kaj solida kiom nia kutima mondo; kaj tial la esprimo "superfizika" povas esti uzata nur en la signifo "super la fizika materio de nia kutima mondo".

Preskaŭ kun timo kaj tremo mi kuraĝas skribi pri ĉi tiuj miaj spertoj. Sed oni ja almenaŭ ne povas akuzi la temon pri manko de intereso, tial ke ĝi, se ĝia bazo montriĝos vera, ja koncernas nin ĉiujn. Al mi la ekzisto de "transtera" mondo kaj daŭrigota vivo de la homa mio en ĝi ĉiam estis natura kaj logika penso. Sed ne estas eble al tute ordinara homo



jam antaŭ la fizika morto esti favorata per pruvoj (eĉ ne subjektivaj) pri la ekzisto de tia transtera mondo; tio estas sperto, kiun mi faris dum la pli posta parto de mia vivo. Sed ke neordinaraj homoj tre ofte atingis koniĝon, eĉ multe pli gravan, en tiu kampo, tio ja estas bonkonata afero pri kio oni povas legi en la literaturo. Oni pensu ekzemple pri la fama sveda teozofo Emanuel Swedenborg.

Mi ne ŝatas docenti aŭ dogmatiki, sed por pli bone komprenigi la problemon estas konsilinde menci la aserton de fakuloj, ke homoj krom la fizika korpo posedas pli subtilan, la tiel nomatan astralan. Tiu en maldorma stato de la homo estas dense kumligita kun la pli densa korpo, sed dum dormo ĝi estas apartigita de tiu kaj kapablas fari observojn en la astrala mondo. Tiu konsistas el astrala substanco, kiu estas nevidebla al homoj en nia pli fizika mondo, sed spite al tio en sia medio estas tiom solida kiom la alia. Ĝi nome estas materio "sur alia ondlongo".

Tre multaj homoj konas la plaĉan kaj liberigan sonĝon, ke ili kapablas flugi — kvankam sen flugiloj. Tio estas pli malpli klara memoro pri la cliĝo de la astrala korpo dum la dormo. Sur egiptaj monumentoj estas trovitaj bildoj de la astrala korpo ŝvebanta super la dormanto kaj ekipita per flugiloj por prezenti la liberan moviĝon en la spaco.

Dana studentino iam rakontis al mi aferon tre neordinaran. Ŝi plurfoje sukcesis nur per la volo eligi sin el sia fizika korpo kaj tiamaniere kapablis viziti la ĉirkaŭon, dum ŝia fizika korpo trankvile kuŝis sur sofo. Mi devas aldoni, ke la nomita studentino estis tute sana, vigla kaj tre inteligenta. Ŝiaj eksperimentoj kaŭzis sensacion antaŭ kelkaj jaroj.

Sur bazo de la supraj klarigoj oni pli bone komprenos la sekvantajn raportojn, kiujn mi tamen pro la spaco devas resume redoni.

Pasintjare (1948) mi iam vekiĝis je la dekdua kaj duona en la nokto post komence ordinara, iom nebula sonĝo, kiu poste transformiĝis en veran travivaĵon. Pri la sonĝo mi memoras nur ke mi estis kune kun pluraj personoj (konatoj aŭ parencoj). Post mia disiĝo de ili mi foriris, sed subite la malklara scenejo transformiĝis en tagluman kaj verecan bildon, kio

ĉio estis reala kaj ne sonĝa. Mi eniris grandan, pentrinde aspektantan vilaĝon kun multaj stratetoj, plenaj de malnovaj, dense lokitaj domoj. Mi rapide trapasis la stratetojn tre interesita pri ĉio, kion mi vidis. Ĉio ŝajnis al mi nekonata, sed subite mi venis al loko en la vilaĝo, kiun mi je mia plej granda surprizo rekonis de pluraj antaŭaj (ordinaraj) sonĝoj pri lando, kiu ĉiam ŝajnis al mi troviĝi trans vasta maro. Nun mi deziris konstati la verecon kaj solidecon de la ĉirkaŭaĵoj, kaj tial mi iris al la plej proksima domo metante mian manon sur la muron — kaj ĝi estis firma kaj malmola. Ĉe la muro staris ligna ŝtupetaro. Ĝin mi iom translokis, kaj ankaŭ ĝi ne estis fantomo. Tuj poste ŝanĝiĝis la scenejo, kaj mi troviĝis en mia lito.

Ĉe alia okazo mi vizitis grandan kunvencon, plenan de homoj. Iom post iom mi konsciiĝis en tiu mondo. Mi vidis maljunan virinon, kiun mi iamaniere rekonis. Iu sinjoro adresis kelkajn vortojn al mi, kaj sinjorino parolis al mi svede. Fine mi atingis absolute plenan kaj klaran konscion, ĉio estis palpeble reala. Elirante mi pretarpasis vandon kaj tuŝante ĝin rimarkis, ke ĝi estas firma kaj kompakta. Ĝi konsistis el flava substanco, iom simila al sukero. Nun mi estis ĝuste ĉe la transiro al la ordinara fizika konscistato. Mi sentis, ke mi devas forlasi la alian staton, kaj mi pasis efektive kvazaŭ super sojlon en la ĉiutagan mondon.

Kelkajn aliajn similiajn spertojn mi povus rakonti, sed mi cedas pro la limigita spaco.

Oni povas prave demandi, ĉu la menciitaj aferoj apartenas al ia "postmorta" regiono aŭ ĉu ili estas astralaj kopioj de lokoj en nia konata mondo. Nu, aŭ unu aŭ alia. Sed mi havas kelkajn spertojn, kiuj temas nur pri la postmorta sfero.

Antaŭ pluraj jaroj en iu mateno, kiam mia konscio estis ĝuste ĉe la limo inter la du mondoj, mi havis rimarkindan kaj neforgeseblan travivaĵon. Kvankam mi estis sufiĉe konscia pri tio, ke mia fizika korpo kuŝas en la lito, mi tamen trovis min staranta, kaj flanke de mi staris persono, kun kiu mi estis intime ligita, sed kiu fizike mortis du jarojn antaŭ la koncerna tempo. Ni interparolis sciante ke ni baldaŭ devas disiĝi, kaj subite tiu persono ĉirkaŭbrakis min. Kaj mi verdire sentis tiun



ĉirkaŭbrakon firma kaj reala. Du aŭ tri fojojn en postaj jaroj mi havis tute similajn spertojn, sed pro intimaj kaŭzoj mi ne povas pli detale priskribi ilin. Mi antaŭe skribis, ke konato rakontis al mi tute samspecajn okazojn, sed ankaŭ ili ne estas detale redoneblaj. Temas pri persono, kun kiu mi amike rilatis de multaj jaroj kaj kiu laŭ mia plej firma konvinko estas absolute fidinda.

Eble oni nun komprenas, kiel estaĵo ankoraŭ vivanta sur la tero povas korpe senti kaj tuŝi estaĵon de la superfizika (metapsikia) mondo. Kiel jam dirite tio povas okazi, nur kiam la persono ankoraŭ vivanta ĉi tie troviĝas en sia astrala korpo, ĉar tiam ambaŭ personoj estas "sur sama ondlongo". Estas konata popola diro, ke homoj sur la tero povas pasi tra la "mortintoj" kaj inverse sen (ĝenerale) rimarki tion. Persono aŭskultas prelegiston en radio, sed jen li turnas la kontaktilon de la aparato kaj la voĉo malaperas, kvazaŭ ĝi estus neniam ekzistinta. Tio estas kompara bildo, ne tute analoga al la ĵus nomita afero.

Cio, pri kio mi supre raportis, havas almenaŭ unu gravan mankon, nome ke ĝi donas nenian objektivan pruvon. Estas vere. La ekzisto de la metapsikia mondo estas provebla, sed almenaŭ ĝis nun la pruvoj povas esti nur subjektivaj. Kaj la supre rakontitaj aferoj estas al mi plene veraĵ, tion mi povas nur aserti konforme al mia konscienco.

## La forĝisto kaj la bakisto

*De Johan Herman Wessel*

*El la dana: Poul Thorsen*

Ekzistis eta urbo, forĝisto vivis tie,  
danĝera estis li, kolera histerie.  
Li malamikon havis (facilas ja ĉiame,  
mi mem nenium havas, al vi okazu same!)  
Por ambaŭ malfeliĉo estis,  
ke ili en drinkejo festis.  
Kaj ili drinkis (same mi deziras,  
nur tial mi drinkejon iras.  
Leganto, tuj mi rimarkigas,  
nur al honestaj mi navigas.)  
Nu, ili drinkis  
kaj kvereladon tuj atingis.  
Per pugno la forĝisto svingis  
por tiom forta frapo,  
ke frakasiĝis kapo,  
kaj por bakisto lumo de l' tago sin estingis.

Tuj en karceroj la forĝist' troviĝas,  
atesto pri perforta mort, sufiĉas,  
ĝin tuj al tribunalo barbir-kirurg adresas.  
Enquete la murdinto la krimon plenkonfesas.  
Esperon donis ja la penso en naivo:  
la morta min pardonos en la postmorta vivo.

Sed aŭdu burleskaĵon! En la dato  
antaŭe ol okazu severe la juĝado  
kvar samurbanoj iras  
al la juĝist' kaj diras:

"Plej saĝa tribunalo!

Ni scias, ke vi ĉiam nur nian urbon benas,  
sed ĉi-okaze tuta la urba ben' devenas  
el unu ago nur: ke la forĝist' revenas.



Per lia mort' viviĝos ja ne bakist' kompata,  
pli taŭgan metiiston ol li ni ja ne havas.  
Pro lia krimo estas la tuta urb' punata,  
komprenu do, lin helpi por ni trecege gravas!"

"Pripensu nur, amikoj, ke vivo pagu vivon." —

"Sed loĝas ja alia bakisto, eĉ malforta,  
pro aĝo kaj mizero li estas preskaŭ morta.  
Eĉ du ni havas, prenu prefere la pli aĝan,  
per tio pagas vivon ja ankaŭ unu vivo."

"Ververe", diris la juĝist', "ido' kun perspektivo.  
Prokrasti mi la juĝon devas,  
ĉar gravo de l' afer' admonas;  
volonte vivon mi al la forĝisto donas!  
Adiaŭ, popolanoj, la eblon faros mi."  
"Adiaŭ, saĝa tribunal', adiaŭ kun graci'!"

Fingrumas li rapide foliojn de la kodo,  
sed li nenion trovas kontraŭan al la modo  
bakiston ekzekuti anstataŭ la forĝisto.  
Li diktas al registro  
la jenan juĝon laŭte  
(alvenu nur por aŭdi!):

"Verfakte la forĝisto Jens  
plenplene kulpas laŭ la senc'  
de l' leĝo, ĉar konfes' indikis,  
ke li bakiston elmondigis.  
Sed ĉar la urbo nur posedas  
forĝiston unu, mi koncedas:  
Se ni mortigas lin, ni tro stultege agas,  
ĉar panon de la urbo eĉ du bakistoj bakas.  
Verdikto tial jene sonu:

Pli aĝa la bakisto donu  
pro l' fia murdo sian vivon.  
La puno estas plej severa,  
ke samspeculoj tremu pro la averta forto."  
Ploreĝis la bakist' mizera  
pro la terura sorto.

#### Morale:

Pretigu vin por mort-invito,  
ĝi venas ĉiam kun subito.

**Noto de la tradukinto:** Johan Herman Wessel naskiĝis 1742 proksime al Oslo. Lia sanstato ne estis kontentiga, kaj lia energio sekve tre modesta. Li neniam sukcesis fini siajn ekzamenojn, sed fariĝis "eterna studento" ĉe la Kopenhaga Universitato. Lia ĉefverko estas "Amo sen ŝtrumpoj", tre trafa parodio de la tiutempaj solenaj, troformalaj dramoj. Rondo de gajaj kolegoj inspiris lin verki komikajn poemojn, el kiuj la supra estas unu el la plej konataj. Ĝi fariĝis dana klasikaĵo. Wessel mortis jam 43-jara.

## Al ĉiuj esperantistoj

Estimataj gesamideanoj!

Mi havas lerni Esperanto dum longan tempon, kaj mi havas trovi, ke ĉi tiu lingvo ne estas facile lernita. Mi estas tute konvinka, ke neniu esperantistoj certe scipovas, kio estas inkorekta kaj korekta. En la lingvo ekzistadas tiom multe gramatiko, ke homo ne sciadas, kiam oni devas diri lernita aŭ lerninta, skribonta aŭ skributa et cetera, et cetera. Kaj multe aliaj malfacilecoj ekzistadas. Por tio mi estas tute certa, ke nenia esperantisto reale regadas la lingvon. Oni nur ŝajnas, ke oni povas, sed reale ĉiu paroladas kaj skribadas en sia propra vojo, kaj neniu povas deklari, ke li parolas la justa



lingvo. Kaj por tio neni povas neniam reale lerni Esperanto.

Krome tio estas tiel malmulte esperantistoj, ili estas en la mondo kiel pingloj en fojnamaso.

Mi ankaŭ havas lerni la Angla lingvo, kaj ankaŭ ĝi aspektas min malfacile. La gramatiko estas malgranda, sed tiu malgranda estas malfacila, kaj la plej malfacilaĵo estas la prononciado. Sed preskaŭ ĉiu homoj konas la Angla lingvo, kaj en ĉiu landoj multege homoj lernadas ĝin. Por tio la Angla lingvo aspektas min multe pli bone kiel internacia lingvo ol Esperanto, kaj se oni simplifigas la skribado kaj la gramatiko, ĝi estos estonta ankaŭ facileca.

Kaj nun mi estas montri vin, kiel simpleca kaj facileca la Angla lingvo povas estonta.

Naŭ Aj rajt the Inĝliŝ lengŭiĝ es Δj think mens oth tu rajt end spik it ŭith rigard both tu gremmer end pronensieŝn. The ŭei ov spelling ju si jursel hir in maj letter; end es tu the gremmer Aj naŭ bi tu giv ju sem hints ebaŭt it. The Inĝliŝ lengŭiĝ bi meĉ izier if ŭi juz onli ŭen form ov the verb. Thei olredi sei "cut", put, let" et cetera in the preznt tajm end also in the past end in infinitiv end in the participl. Du so ŭith ol verbs! For igz: tu bi (erlier: to be), Aj bi, ju bi, hi bi, ŝi bi... Imperfikt: Δj bi... Perfekt: Aj hev bi... Pluperfikt: Aj hev bi... Fjuĉer: Aj ŝel bi... Aj hop ju enderstand mi end it bi tu bi hop thet ol mens ŭill lern thiz simplifaj Inĝliŝ. Es tu the naŭns Aj think ju hev olredi observ thet ŭi ol ŭiz onli hev tu put en s tu the singjuler form: pen — pcns, fut — futs, men — mens.

I tok ŭith en tiĉer in Inĝliŝ ebaŭt maj sistem. Hi don't lajk it meĉ end sei it bi e krajm egeinst the spirit ov the lengŭiĝ end egeinst the kelĉer ov the the Inĝliŝ teng. Ŭot ŭill Ĉoser sei ov seĉ e disfigjureŝn, ŭot ŝeikspir, ŭot Semjuel Ĝonsn? Aj don't no ŭot thei ŭill think end Aj don't enderstand ŭot bi the so-kol spirit ov the lengŭiĝ. Preps it bi semthing lajk Kalocsay end ether lern mems hu hev meik Esperanto so diffikelt onli for tu meik es biliv thet thei master it. Bet ŭot Aj no end enderstand bi thiz thet ŭi nid e simpl end izi lengŭiĝ for ol mens end thet sim tu mi mor importent then sem old rajters end their spirits.

Pot the progress ov the ajdie ov en interneŝonel lengŭiĝ, for the pis end for the heppi fjuĉer ov jumenhud it bi ebseljutli neseseri tu lern thiz simplifaj Inĝliŝ end tu difjuz it ol over the ŭerld. Ŭi bi modern mens, ŭi bi no Ĉosers end ŝeikspirs end Ĝonsns. Rajt tu mi! Ŭi ŭill start e peiper end meik en esossieŝn for the difjujn ov the simplifaj Inĝliŝ.

Jurs sinsirli

Ĝonti Ĝester.

## Debato

Letero al la japana samideano,

kiu skribis en nro 4/50 de MR, ke "komunistoj nomas ĉiujn 'malamikoj', kiuj ne apartenas al ilia ideologio".

Mi komprenas, ke en multaj landoj — kaj speciale en Japanujo, kiu estas sub usona aŭtoritato kaj kie certe estas granda oficiala propagando kontraŭ la komunistaj ideoj — multaj ne ŝatas la komunistojn, kvankam ĉe la japana samideano rekonis, ke "la komunistoj tre malamas la militon" kaj sekve estas por paco kaj, mi povas aldoni, por interkompreniĝo, solidara kunlaboro, reciproka helpo. Ĝuste esperantisto povas tial plenkonsente subskribi tiajn celadojn, kaj ne estas necese certigi al alilandanoj, ke li ne estas komunisto kaj ne korespondas kun sovetaĵ esperantistoj.

Kvankam tio ne estas konforma al la komunista ideologio, al instruoj de Lenin kaj Stalin, estas kompreneble, se komunisto en ekzemple Japanujo fariĝas suspektema kaj rigardas ĉiun, kiu ne estas lia samideano, kiel "malamikon", ĉar tie ili povas labori nur kaŝe, inter multaj danĝeroj, kaj oni ne povas ne rimarki ilian kuraĝon kaj sentimecon kaj oftan oferpretecon por la popolamaso. En la landoj, kiuj nomiĝas "demokratiaj" sed kiuj efektive estas regataj de kapitalistoj kaj iliaj kunliganoj, oni persekutas la komunistojn. La posedantoj timas tiun sistemon, kiu ne volas lasi la produktilojn en la manoj de unuopaj personoj kaj kiu ne volas permesi, ke laborantaj homoj estu ekspluatataj por la profito de kelkaj personoj.



Vera komunista celado estas amikeco al ĉiu laboranta homo de kiu ajn deveno kaj profesio. Ili tute ne celas, ke ĉiu homo fariĝu komunisto, eĉ ne ĉiu laboristo. En Sovetio la partio enhavas nur malgrandan parton de la loĝantaro. Simile estas en la popoldemokratiaj landoj, kie la laboristaj kaj socialistaj partioj havas la gvidrolon, kune kun la vilaĝanoj. Oni eĉ ne akceptas iun facile kiel membron de la partio. Tio okazas nur post zorga ekzameno de lia vivado kaj konduto.

Multaj en okcidentaj landoj kaj ankaŭ en malproksima oriento ne scias, ke la karakterizado de esperantisto, en la sama nro de MR, de Carlos de Jesus en lia Samideana letero: "ami la proksimulon, respekti fremdajn popolojn kiel la sian kaj samrangigi la unuajn kun la lasta en kampo de rajto kaj justo... pledo por paco kaj frateco...", estas identa kun la komunista moralo kaj devo. Detale vi povas legi pri tio en la edukaj verkoj kaj paroladoj de fama komunista ideologo, la mortinta Kalinin.

Vere la komunista ideologio baziĝas sur la materialisma mondkoncepto, kaj laŭ ĝi oni instruas en la lernejoj, skribas en la ĵurnaloj. Sed la partio ĉie postulas respekton al religio, kio enestas ekzemple ankaŭ en la hungara popoldemokratia konstitucio. Antaŭ ne longe deklaris Jozsef Révai, unu el la partiestroj, ministro de popoledukado: "Kiel ĝis nun ni ankaŭ estonte estimos la religian konvinkon, ni konfesas kaj realigas la plenan religian liberecon en la ŝtata vivo." Se la partio aŭ la registaro batalas kontraŭ tiuj eklezianoj, kiuj malhelpas la konstruan laboron kaj la pacan celadon de la popolo, tiu batalo, kiel li diris, "estas ne kontraŭ la religio, kontraŭ la krodo, eĉ ne ĝenerale kontraŭ la eklezio". Li diris, ke eĉ inter la partianoj estas multaj religiaj homoj. Tiuj konsideroj gvidis unue al interkonsento kun la protestantoj kaj lastatempe kun la katolika eklezio, kies episkopo deklaris, ke la katolika konvinko tute ne kontraŭas la fidelecon al la popoldemokratio kaj al kunlaboro por konstrui patrujon. Ili kondamnis ankaŭ la uzon de la atombombo kaj ĉian militan instigadon kaj aprobis la pacoceladon de la registaro. La registaro certigas la funkcion de la restintaj ekleziaj lernejoj kaj partoprenas en la kovro de la elspezoj de la eklezioj, precipe por ke la pastraro ricevu

konforman vivsubtenon. Ĉu tio estas malamika sintenado?

Simile oni devas menci la rilatojn al aliaj nacioj kaj popoloj. Gvidanta ideo estas la instruo de Sovetunio, kiu realigis la egalrajtan kunvivon de pli ol cent diversrasaj kaj diverslingvaj popoloj — inter ili tute etaj jam al ekstermo kondamnitaj popoloetoj, kiuj nun evoluigas propralingvan kulturon kun loka aŭtonomio. Soveta libro skribas pri la lasta mondmilito: "La hitleran ideologion de la besta naciismo kaj la rasa malamo venkis la soveta ideologio, kiu konfesas la samrajtecon de ĉiuj rasoj kaj nacioj, la ideologio de la amikeco de la popoloj." Laŭ la vortoj de Stalin "en la soveta patrioteco harmonie kunfandiĝas la naciaj tradicioj de la popoloj kun la komunaj intereso de ĉiuj laborantoj de Sovetunio. Samtempe la popoloj de Sovetunio estimas la rajton kaj sendependecon de la popoloj en aliaj landoj kaj estis ĉiam pretaj vivi pace kaj en amikeco kun la najbaraj ŝtatoj". Jen sumigo de la komunista principoj pri tiu demando: "Forigo de ĉiaj rasaj privilegioj, samrajteco de ĉiuj nacioj kaj neofendebleco de ilia teritorio, liberigo de la subpremitaj popoloj kaj restarigo de iliaj suverena rajtoj, rajto de ĉiu nacio aranĝi sian landon laŭ sia propra deziro, restarigo de la demokrataj liberecoj". Oni celas reciprokajn fidon kaj fratan kunlaboron de la popoloj.

Eĉ se ili nuntempe ne akceptas ian internacian lingvon, Stalin en lingvostudaj artikoloj pasintsomere deklaris, ke iam en la epoko de mondsocialismo, kiam realiĝos la reciproka fido kaj alproksimiĝo de la nacioj, ĉesos la subpremo de la lingvoj. Oni organizos la kunlaboron de la nacioj kaj tiam la ĉefaj lingvoj kuniĝos en komunan internacian lingvon, kiu estos nek la germana, nek la rusa, nek la angla, sed nova lingvo, kiu enhavos la plej bonajn elementojn de la naciaj kaj zonaj lingvoj.

Ĝis tiu tempo evoluos, laŭ Stalin, en certaj kunlaborantaj terzonoj tiel nomataj zonlingvoj. Efektive oni vidas nun la regadon de la rusa lingvo en certa terzono kaj de la angla en alia terzono. Laŭ la opinio de la komunistoj tio ne estas la lasta vorto en tiu demando. Kaj la esperantistoj samopinias. La mondo devas progresi. Ni helpu, por ke ĝi progresu en paco! Ĉiu kunhelpu al amika kunlaboro, al evoluo kaj konstruo.

P. Balkányi.



### Red. komento.

La vortoj, kiujn Balkányi citas en la komenco de la supra skribaĵo, citis Masao Kakuo el artikolo de mi en MR nro 1/50 (Kie oni malhelpas esperanton). Miaj vortoj estis: "Laŭ ĝia ideologio (tiu de stalinisma reĝimo) ĉiuj, kiuj ne estas stalinismaj komunistoj, estas iliaj malamikoj kaj batalas por kapitalismo kaj imperiismo." La komunismaj gazetoj kaj radiosendoj asertas, ke socialdemokratoj, liberaluloj kaj konservativuloj konscie aŭ nekonscie servas al kapitalismo kaj usona imperiismo. Ĉu ne estas tiel? Ĉu tiu, kiu helpas malamikon, ne estas rigardata kiel malamiko? Tute klaran informon pri la tiurilataj komunismaj konceptoj donas la verkoj de Lenin kaj Stalin, ankaŭ rilate al provizora komunisma kunlaboro kun reformistoj.

Balkányi skribas, ke vera komunista celado estas amikeco al ĉiu laboranta homo de kiu ajn deveno kaj profesio. Tio estas ne vera. Kiu ajn laboranta homo, eĉ la plej proletaj, kiu havas aliajn sociajn konceptojn ol tiuj de la reĝimo kaj la dogmaro, ne estas amike rigardata.

Balkányi diras, ke "ami la proksimulon, respekti fremdajn popolojn kiel la sian kaj samrangigi la unuajn kun la lasta en kampo de rajto kaj justo... pledo por paco kaj frateco..." estas identa kun la komunista moralaj kaj devo. Lenin diras en Stato kaj revolucio (la citaĵo el Fundamentoj de leninismo, de Stalin) ke "la diktaturo de la proletaro, ne limigita per leĝo kaj apoganta sin sur perforto, estas regado de proletaro super burĝaro". Tio kompreneble rilatas al la diktatura, la revolucia stadio. Tamen oni ankoraŭ troviĝas en tiu stadio. Kiam la burĝaro estas likvidita restas aliaj homoj, kiuj eventuale povas havi konceptojn diferencajn de la oficialaj. Tiuj ne estas amataj proksimuloj, respektataj fremdaj popoloj. Ĉu oni amis kaj respektis tiun parton de ingra, estona, latva kaj litova popoloj, kiu estis nekomunisma? Komunisto devas respondi, ke komprenebla ne. Alie li ne estus komunisto.

La menciitaj komunismaj konceptoj validas ankaŭ rilate al religia libereco.

Balkányi skribis en letero, kiu akompanis lian skribaĵon, ke mi ne forgesu aldoni en eventuala polemiko, ke "tiuj estas la bonvolaj instruoj, doktrinoj, kiujn vere honestaj, bonvolaj

komunistoj, gvidantoj kaj simplaj homoj intencas kaj provas realigi. En ĉiu sistemo kaj politika ordo estas homoj kiuj malgraŭ la belaj principoj ne obeas ilin aŭ faras kontraŭon. Tio ne povas esti kondamno kontraŭ la komunismo sed nur kontraŭ unuopaj personoj."

Mi skribis la suprajn rimarkigojn ne kiel atakon kontraŭ Balkányi. Mi estas plena konvinkita, ke li estas tute sincera kaj ke ekzistas multaj komunistoj, kiuj estas kiel li. Certe ni havas diversajn erarajn imagojn pri la vivo en Sovetio, kaj same Balkányi kaj liaj sampensanoj iom eraras rilate al la vivo ĉe ni. Ekzemple Svedujo nomiĝas "demokrata" lando kaj sekve devus esti regata de kapitalistoj kaj iliaj kunliganoj. Pri tio konsentus en Svedujo neniu krom la komunistoj. La "kapitalistoj" estas almenaŭ same multe regataj de la "laboristoj" kiel male. Verdire la vorto kapitalisto fariĝis iom arkaika, la vorto laboristo restas, sed ĝi ne signifas proleton. Ĝi estas vorto por homo, kiu honeste faras sian parton de la laboro en la socio. Gvidantoj de entreprenoj kaj "la laboristoj" pace kaj kun respekto kaj interkompreno interkonsiliĝas pri la laboro kaj ĝiaj problemoj kaj same pri siaj bezonoj, rajtoj kaj devoj. Ni ne sentas nin nek estas regataj de kapitalistoj kaj iliaj kunliganoj. Al tio gvidis nin grandparte la "reformismo" sed ankaŭ kaj en ne malgranda grado, komuna tutsocia pliboniglaboro.

Mi skribis tiujn ĉi rimarkigojn ankaŭ ne kiel atakon kontraŭ la stalinisma komunismo. Mi havas nur la deziron, ke kaj sovetianoj kaj ni nesovetianoj havu kiel eble plej klarajn konceptojn pri la aferoj, pri kiuj ni diskute parolas, kaj ke ni uzu vortojn kiel eble plej adekvatajn al la realo kaj al niaj konceptoj.

Mi volonte donos lokon por diskuto pri la demandoj tuŝitaj de Balkányi. En tia eventuala diskuto ni tamen devas zorge atenti pri kelkaj punktoj. La stalinisma komunismo severe sekvas la konceptojn donitajn de Marx, Lenin kaj Stalin, ili estas la premisoj por ĉiu pensado, kiu rekte aŭ nerekte rilatas al la socia vivo, ili estas la bazo por la socia agado. Sekve tia diskuto devas temi pri principoj, ne pri personaj sentoj kaj inklinoj. Kiel bazo por diskuto estas nepre necese havi komu-



nisman respondon pri kelkaj fundamentaj aferoj. Ĉu la konceptoj en la verkoj de Lenin kaj Stalin plene valoras kiel principoj por pensado kaj agado sub stalinisma reĝimo? El ĉio, kion mi legis kaj aŭdis, mi ricevis la impreson, ke jes. Ĉu tiuj konceptoj estas rigardataj kiel absoluta vero, kiel netuŝeblaj kaj neŝangeblaj, aŭ ĉu oni povas diskuti ilin kaj eventuale, trovinte alian konkludon, povas anstataŭigi iun principon per alia? Laŭ ĉio, kion mi legis kaj aŭdis, ŝajnas al mi, ke la konceptoj de Lenin kaj Stalin estas rigardataj kiel leĝo por ĉiu pensado kaj agado, kiuj rekte aŭ nerekte rilatas al la socio. Se tiel estas, diskuto ne estas ebla. Diskuti oni povas nur tiam, kiam ambaŭ partoj premise rekonas, ke ili ne posedas la absolutan veron kaj ke ili ne komprenas, kio estas absolute plej bona, sed serĉas la veron kaj ion pli bonan ol la nunan. Sed se la oficiala interpreto de la stalinismaj konceptoj permesas diskuton pri ili kaj rekonas, ke eventuale ne ĉio en ili estas ĝusta kaj ke oni povas teorie kaj praktike modifi kaj eĉ anstataŭigi certajn konceptojn — tiuokaze diskuto estas ebla kaj certe ankaŭ valora. Por ni, kiuj ne estas stalinismaj komunistoj — kio neniel signifas ke ni kondamnas aŭ malestimas la sovetianojn — estas memkomprenbla afero, ke niaj konceptoj estas diskutuablaj kaj ke la pli granda parto el ili estas mankohavaj kaj plibonigeblaj.

S. Engholm

#### Pri la "Dek Vortoj".

Fakte E. Kuder-Mátéffy (MR 4/50) ne donis aliajn pensojn pri etiko ol mi. Ĉiuokaze mi konsentas, ke moraleĝoj atingas sian plej altan celon nur kiam la karaktero de ordono malaperas kaj donas lokon al memvola etika inklino. La Dek Vortoj de Mosco venis ĝuste el tia propra moralinklino. De kie ili alio-kaze eĉ povus veni? Moseo esprimis sian moralkoncepton en formo de moralaj ordonoj. Tio ne estas riproĉinda. Ankaŭ Jesuo faris al la homoj severajn etikajn postulojn. Morala socia kunvivo apenaŭ estas imagebla sen tia lingva transdono de la moralsento.

En mia artikoleto (MR 1/50) mi faris nenian valordistingon inter tiu kaj alia religioj. Mi skribis tie: "Preterpase mi volus

atentigi pri unu ekzemplo de grandioza perspektivkapablo. Ni trovas ĝin en antikva miniatura dokumento: la Dek Vortoj." Same bone mi povus doni aliajn ekzemplojn, kvankam ne tiel malnovajn. Mi pensis ankaŭ, ke pli postaj moralkonceptoj, certe tiu de Jesuo, iel ŝuldas al klasika juda pensado kaj unua-loke al la fama dekalogo.

La morala valoro de la Dek Vortoj estas pli frue debatita en MR. Nova pritrakto eble tedos. Tial sufiĉu unu atentigo. Moseo deziris, ke la homoj ne avidu, tio signifas, ke ili ne havu malbonajn pensojn. Ne mortigi kaj ne ŝteli povas esti ekstera obeo al la moralkodo. Sed ne havi malbonajn inklinojn ja estas la plej esenca afero de etiko. Formale la preskriboj "Ne ŝtelu" kaj "Ne mortigu" estas parencaj al niaj juraj leĝoj. La socio punas murdojn kaj ŝtelojn, kiam ĝi trovas la kulpintojn. Sed la socio ne povas puni malbonajn inklinojn. Oni eĉ ne povas elpeli ilin per ia fortimiga fabelo pri venĝema Dio. Moseo deziris, ke la homoj mem ne volu mortigi kaj ŝteli!

Mi konas la opinion de kelkaj teologoj, laŭ kiuj Mosco neeble povis havi jam tiel evoluintan kaj maturan moralsenton. Sed la sciencula supozo, ke la dekalogo estas verkita ne en unu lago kaj ne de unu persono neniel difektas ĝian etikan valoron.

Kiu aŭtoris la Dek Vortojn?

La biblio diras, ke Dio mem proklamis ilin. En mia artikoleto mi skribis pri tio: "Sublima estas ankaŭ la malnova, juda penso, laŭ kiu la revolucio okazis en la dezerto, en loko libera por ĉiuj. Neniu popolo povas pretendi, ke en ĝia regiono estis iam proklamata la universala leĝo."

Dio, la Absoluta Moralo, proklamis ĝin por ĉiuj. Laŭ mia etika sento — kaj ankaŭ laŭ mia poezia sentopovo! — ĝuste tia devas esti la popola fabelo pri la estiĝo de la Dek Vortoj, ĉar nur en tia senpersona prezento ĝi estas, ne juda sed universala, homarana simbolo de io pli alta.

L. C. Deij.



# Malgranda Revuo

La kosto por 1 ekz. de MR estas nun 1 kr (preso, honorarioj, afranko) kaj ĝi estas presata en 600 ekz. (Ĉar nur 450 estas vendataj, la efektiva kosto por unu ekz. estas 1,33 kr.) La enspezo de unu vendita ekz. estas meze 0,80 kr. Certa parto el la vendataj ekz. iras al landoj, kie oni ne povas elsendi monon, kaj la certa elspezo de unu nro estas maksimume 300 kr.

Ĉar mi mem ne havas monon por pagi pluan eldonadon, la revuo estos eldonebla nur kun 800 abonantoj. Mi tamen komencos la jarkolekton 1951. Se la dirita nombro ne estos atingita ĝis la apero de nro 2/51, mi ne vidas eblecon por daŭrigo. Mi supozas, ke tiu nombro ne estas atingebla sed tamen mencias la aferon.

Pro antaŭe menciita kaŭzo kaj pro kompostmaŝina difektiĝo tiu ĉi nro estas multe tro malfrua. Kredeble ankaŭ nro 1/51 malfruiĝos, sed la presejo promesis, ke la preliĝo poste estos akurata.

S. Engholm.

---

**KOREKTO** Pro skribararo de la red. estiĝis bedaŭrinda fuŝo en nro 5, p. 1, linio 8 de la poŝtteksto: ". . . kiu ne dibočas". Devas esti: ". . . kiu min dibočas". Afable indulgu kaj korektu.

---

# Enhavo de Malgranda Revuo 1950

(La unua cifero indikas la numeron,  
la dua la paĝon.)

## BIOGRAFIO

D. A. Werner: Albert Schweitzer, 2/2; H. Valckenier: La pluvera preludo, 2/35; J. Kohen-Cedek: Max Nordau, 3/1; R. Sakowicz: El mia vivo, 5/22; S. Engholm: P. Th. Justesen, 5/28.

## FILATELIO

J. Fechter: La poŝtmarkoj de Keren kaj Jemmet Lejizrael, 6/3.

## HUMANISMO, FILOZOFIO, PSIKOLOGIO, RELIGIO

L. C. Deij: Pensoj pri etiko, 1/1; P. Carreiro Neto: La spirita mondo, 1/14; K. Wilgenhof: Kelkaj facetoj de logiko, 2/5; L. C. Deij: Pensoj enkorpiĝas, 2/29; Karel Čapek: Pri kreado, 2/30; Max Nordau: Ĉu postmorta vivo estas dezirinda?, 3/11; J. D. Sayers: Homaranismo kaj etiko, 3/13; H. Otto: Evangelisches Johannesstift en Berlin-Spandau, 3/16; J. Régulo Pérez: Pri la eŭropa olimpo, 4/1; J. Kohen-Cedek: El la tempoprofundo, 5/4; C. Joon: Potenco kaj perforto, 5/15; Fr. v. Schiller: Kiel rigardi historiajn personojn, 6/1; K. Wilgenhof: Ekstersensa perceptado, 6/7; Ch. Heilskov: Pri verecaj sonĝoj, 6/14.

## KOMENTOJ KAJ DEBATO

Pri "Germana letero" (de Elisabeth Bünemann), 1/18; Kluba problemoj (red.), 1/21; Kie oni malhelpas esperanton (S. Engholm), 1/28; Grava rimarkigo (S. Engholm), 2/12; Nova germana letero, 2/14; Israela letero (J. Kohen-Cedek), 2/22; Miskompreno (pri represo de artikoloj, de S. Engholm), 2/38; Kial la malfacilaĵoj? (pri malhelpo al esperanto en la or. gorm. zono, de Zimmerman), 3/27; Kiel logi la anojn al niaj klubkunvenoj (E. Hult), 3/29; Respondo al "Israela letero" (Ru-



dolf Anders), 4/6; Samideana letero (pri la germanaj kaj israelaj leteroj en MR, de Carlos de Jesus), 4/11; Meditoj pri spiritismo (C. Joon), 4/16; Aliaj pensoj pri etiko (E. Kuder-Mátéffy), 4/18; Voĉo el Japanujo (pri esperanto kaj komunismo en Japanujo, de Masao Kakuo), 4/21; Esperanto en la germana orienta zono (A. P. da Silva; red. noto), 5/30; Letero al japana samideano (pri komunismo, de P. Balkányi; red. komento), 6/23; Pri la "Dek vortoj" (L. C. Deij), 6/28.

#### LINGVAJ ARTIKOLOJ

William Auld: pri majuskloj (ŝerco), 2/36; W. v. Waldowski: Ĉu pliriĉigo de nia lingvo estas malutila?, 4/14; Lingvaj sugestoj, 4/22, 5/32; Al ĉiuj esperantistoj (ŝerco), 6/21.

#### POEMOJ

L. C. Deij: Mirakloŝento, Pensoj, Kontrasto, Tamen, 1/30; L. C. Deij: La gajno, Al la paco, 2/1; W. Auld: Glasgovo, 2/27; W. Auld: Eklogo pri la sankta afero, 5/1; J. H. Wessel (trad. Thorsen): La forĝisto kaj la bakisto, 6/19.

#### POPULARSCIENCO

Thor Heyerdahl: Kon-Tiki kaj la polinezia problemo, 1/3; K. Wilgenhof: Kometoj kaj aerolitoj, 3/22.

#### RECENZOJ

Nro 1: James D. Sayers: Invito al Ĉielo — C. A. Pruissen: Komercaj leteroj — Jarlibro de UEA 1949 — C. Marshall Hattersley: Maŝinoj, mono kaj paco. Nro 2: Ekstrakto el Don Kihote, trad. de Luis Hernández — Stefan Zweig: Brulanta sekreto — Kamemoro: Mary kaj Sulo — Daniel Quarello: Komplementoj de l' verbo. — S. Takunaga: Malsato en riĉa rikolto. Nro 4: Ĉu socialisma libero aŭ kapitalisma servuteco? — Vilho Setälä: Burĝonoj — ABC-libro — Urbo Belo Horizonte — Grava memorando.